

**Kluba Programo:****januaro:**

- 1 Neniu kunveno
- 8 Novjara Festo
- 15 Babil-vespero
- 22 Lingva Studrondo
(1800h: konsilantaro)

29 Adiaŭ al la Londona Irlanda Centro!**februaro:**

- 5 (ĉe **IBIS**) Babil-vespero
- 12 (ĉe **Diorama**) John Wells: *Lingva Seminario*
(1800h: konsilantaro)
- 19 (ĉe **IBIS**) Babil-vespero
- 26 (ĉe **Diorama**) Davido Thornell: Bildvortaroj en Esperanto

marto:

- 4 (ĉe **IBIS**) Babil-vespero

aprilo:

- 1 (ĉe **Diorama**) Jarkunsido

Esperanta Kalendaro:

18-20 marto 2016: 97a Brita Kongreso de E-o; Liverpool.
 Informo: www.britakongreso.org
 23-30 julio 2016: 101a Universala Kongreso; Nitra,
 Slovakio. Informo: www.nitra2016.sk; info@esperanto.sk

Grava Anonco

Sekve de rezolucio kaj diskuto ĉe la lasta jarkunsido, ek de februaro, LEK ne plu kunvenos ĉe London Irish Centre. La ĉefaj kunvenoj okazos ĉe Diorama Arts Studios, 201 Drummond Street, Regent's Place, London NW1 3FE. Por la momento la babil-vesperoj okazos ĉe Hotel Ibis, 3 Cardington Street, Euston, London, NW1 2LW, sed povos okazi aliloke pli poste dum la jaro. Konsultu la programon por konfirmi la kunvenlokojn.



moderna fronto de la Artejo Dioramo

Aliaj anoncoj:

Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la konsilantaro.

Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 19a februaro por mencio en la sekva Kluba Bulteno.

Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere ĉe Londona Irlanda Centro. Antaŭ la ĉefprogramero kaj dum la paŭzo klubanoj kutime amasiĝas en la komforta enirhalo por kaftrinki kaj babili.

Kutima programo:

18:00 malfermiĝo kaj bonvenigoj

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero

22:00 fino



Lokoj: London Irish Centre, 50-52 Camden Square, NW1 9XB (vidu supre)
Hotelo IBIS, 3 Cardington St, NW1 2LW
Artstudioj Diorama, 201 Drummond Street, NW1 3FE

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo: Ne plu validas la ĝisnuna adreso

(<http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek>)

Informojn serĉu ĉe EAB: www.esperanto.org.uk

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo

020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close, Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779 yarrump@gmail.com.

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Roland England, Stan Keable, Olga Kerziouk, Matt Peperell, Antony Rawlinson (Bultenisto), Diana Robin.

Adresoj: David Thornell: Esperanto, c/o London Irish Centre (adreso supre) lek.sekretario@gmail.com;

Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ ap_esp-lek21@yahoo.co.uk,

Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry_page@btinternet.com, anica_page@btinternet.com,

Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.

Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Jen 2016 venas ne nur kun bondeziroj por nova jaro, sed ankaŭ kun diversaj ŝanĝoj ĉe nia klubo. Vi eble tuj rimarkis la plej frapajn. Inter ili estas translokiĝo al aliaj kunvenejoj.

Alia estas modifo de la ritmo de ĉefprogrameroj, tiel ke tiuj lastaj okazos malpli ofte. Ni kunvenos ja ankoraŭ ĉiusemajne; do, ne paniku.

Multaj ŝanĝoj, jes; tamen, bonaj adaptoj, kiuj reordigos aferojn, por ke ĉio denove kaj baldaŭ estos en ordo. Klubanoj bone memoras, tiom ofte oni demandis ilin, kiel akordigi nian komunan vivon kun jam longdaŭraj tendencoj - rilate malgrandiĝon de la membraro, transportadon, averaĝan nombron de ĉeestantoj ktp.

Post longe kaj profunde pripensitaj konsideroj de ĉiuj ebloj, la lasta Jarkunsido produktis Rezolucion, ĝuste pri ĉio tio. Rezulte de la detala kaj zorga enketo de **TERRY PAGE** antaŭ iuj jaroj, la Konsilantaro komencis esplori, kiel plej efike antaŭenigi La Londona Esperanto-Klubon laŭ plej saĝa vojo. Pli lastatempe, sindonema Konsilanto **ARTURO PRENT** transprenis respondecon pri nova ejo. Lia esplorado efektiviĝis, pro ĝustmomenta helpo de **IVOR HUETING**, kiu fakte proponis la vere novan kaj ĉefan ejon, kiun ni nun havas – kaj kiu ne ekzistis dum antaŭaj serĉoj. Plurajn dankojn, Ivor.

Mi ne tajpu multe pli, por ke restu spaco por tiom da novaĵoj, instrukcio, mapo kaj ceteraj gravaĵoj. Anstataŭe, mi deziras al ĉiuj Feliĉan Novjaron, kiun LEKano plej taŭge komencu per zorga legado de tiu ĉi tuta Bulteno – precipe pri datoj kaj lokoj!

Sincere,

David Thornell

